

# BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO  
№ 104, Majo 2019



## Konferenco de REU

### RRK-30

#### 30-a Raport-reelekta Konferenco de REU

2019-07-17/18

Ĉiuj membroj de REU estas invitataj partopreni en la jubilea 30-a Raporta reelekta Konferenco de Rusia Esperantista Unio, kiu okazos 17-an – 18-an de julio enkadre de [Tihvinaj Esperanto Metiejoj — 2019](#) apud urbo Tihvin!

**Ĉiujn partoprenontojn ni petas registriĝi per la [aliĝilo al la Konferenco](#).** Bonvolu registriĝi ĝis la 5-a de julio. La organizantoj bezonas scii kvanton de la partoprenontoj por bone prepari la Konferencon.

Ni esperas, ke eblos organizi ankaŭ distancan partoprenon per Skajpo. Se vi volas partopreni la

Konferencon distance, bonvolu same registriĝi, sed nepre indiku en «notoj», ke vi partoprenos per Skajpo, kaj skribu vian skajp-nomon kaj retroŝtadreson.

Bonvolu sendi viajn proponojn por la tagordo de la Konferenco al la komuna adreso de la organiza komitato — [konferenco@reu.ru](mailto:konferenco@reu.ru). Krome, vi povas skribi la proponojn en la VK-grupo de REU en la koncerna «pridiskuto»: [https://vk.com/topic-163508701\\_39509590](https://vk.com/topic-163508701_39509590)

La dokumentojn por la Konferenco kaj rezultojn de ĝi vi povos vidi en tiu ĉi paĝaro en la rubriko «Dokumentoj» / «REU» / «RRK-30».

[Aliĝilo Aliĝintoj](#)

## Estraro raportas

### Skiza raporto de la Estraro de REU pri la agadperiodo aŭgusto 2017 – majo 2019 j

Nova Estraro en la konsisto de 7 personoj (S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, V. Opletaev, M. Chertilov, A. Mitin, A. Lebedev) ekfunkciis post la 29-a REU-Konferenco, kiu okazis dum RET-2017 en u.Poshehonje de Jaroslavla gubernio.

La Estraro dum la indikita periodo laboris nemalbone, multo estis farita, la laboro de la estraranoj estis kongrua, ĉiuj laŭ siaj eblaj kapabloj bone plenumadis siajn taskojn kaj interhelpis en la komuna laboro. Eblas dividi la agadon je kelkaj ĉefaj direktoj:

#### Renkontighoj

REU organizis aŭ partoprenis en organizo de kelkaj tradiciaj kaj tute novaj renkontiĝoj. Tio estas “Novojarsk-18” (Tomsko), “Novojarsko-19”(Krasnojarsko), “ArTe” en Jalta, RET-2018 en Ŝuja, “Donaj E-Ludoj” (Novoĉerkassko), Zamenhof-Tagoj, “APERo”, Lingvaj Festivaloj en multaj urboj tra la lando, regionaj aranĝoj. Tute nova estis AMO – seminario en Apudmoskvo kaj Lingvaj Trejnadoj en Jekaterinburgo. Renaskiĝas malnovaj regionaj aranĝoj, ekzemple, OSER. Ĉiuj nomitaj aranĝoj meritas nur laŭdojn pro treege riĉenhava programo, bonaj kondiĉoj, laborkapablaj teamoj, inventemaj organizantoj. Estas ankaŭ mankoj. Pro forpaso de lokaj aktivuloj (V. Bespalov, J. Zajdman) tute estingiĝis E-movado en du grandaj kaj iam aktivaj kluboj: Jalta kaj Soĉi. Kune kun la gvidoroj malaperis bonegaj aranĝoj TILE (en Soĉi) kaj “Aroma Jalta”, “Velura Sezono” (en Jalta).

#### Regiona agado

Delonge ni ne havis iujn decajn atingojn kaj raportojn pri regiona agado. En ĉi Estraro pri ĝi serioze kaj fervore okupiĝis I. Gonĉarova. La rezultoj ne mankas. Ege vigliĝis agado en Siberio. Uralo ĉiam estis modelo por landaj kluboj kaj grupoj. Ekaktivis kluboj en kelkaj urboj de Centra kaj Norda Rusio. Bedaŭrinde, malfortas Volgio kaj Sudo. Tamen, tio ne ĉiam dependas de la respondeculo en la Estraro. Ekzistas multaj objektivaj kaŭzoj, nuna aktivularo aĝas, junularo ne ĉie aktivas. Pli detale pri regiona agado raportos mem I. Goncharova kaj unu el la plej agemaj reprezentantoj de Siberio Vladimir Sapoĝnikov. Li vere formis tutan reton de siaj helpantoj en ĉiuj urboj kaj loĝlokoj de vastega regiono kaj aktivigis-laborigis multajn “malvivajn animojn”, eĉ

kunordigas individuojn en tiuj urboj, kie forestas kluboj. La laboro ĉi direkte estas malfacila, sed ĝi movihas, kvankam multaj kluboj, grupoj, individuoj dormetas.

### **Instru-metodika laboro**

La plej sukcesa direkto, kiun gvidas senlaca kaj tre iniciatema V. Opletaev. Ni daŭre sukcese organizas KER-ekzamenojn kaj estas en tria loko (pro organizado) en la mondo inter ĉ. 70 landoj, kie okazas similaj sesioj. En la 2019 la unuan fojon en Moskvo ni sukcesis okazigi skajpan parolan ekzamenon en tri niveloj. La unua sperto estis bonega. En la lando funkcias ĉ. 20 diversgradaj E-kursoj, pri kio V.Opletaev havas konstantajn informojn, kaj la raportoj aperas en la Bulteno de REU. Estas lanĉita speciala “Klubo de instruistoj” en la Bulteno de REU. Kun helpo de kelkaj estraranoj estas kompilita granda Katalogo de lerniloj (ekde 1957 jaro), eldonitaj en nia lando. Dum RET-2018 estis organizita “Instruista seminario”, kiu estis ege utila, interesa kaj imitinda por pliaj aranĝoj. Oni interŝanĝis sperton, konatiĝis kun interesaj instrumetodoj kaj praktika instruado. Lingvaj Trejnadoj en Jekaterinburgo allogas homojn el diversaj partoj de la lando. Ne ĉio el niaj revoj, certe, estas farita. Ni devas serĉi eblecojn diplomigi niajn instruistojn.

### **Eldona agado**

Ĉesis aperi longjara interesa gazeto “ReGo” sun gvido de G.Kokolija. Kaŭzoj estis deversaj. Tamen ni ekhavis fortojn kaj emon perfektigi eldonadon de la “Bulteno de REU”. Ĝi iĝis vera gazeto, ni ricevas laŭdojn el Usono, Brazilo, Kubo, Francio, ktp. “BdR” vere respregulas la vivon kaj agadon de nia landa esperantistaro. Krome, aperas nun sufiĉe ampleksa literatura suplemento al la Bulteno “Cerbe kaj kore”.

Dum la periodo post la lasta Konferenco estis eldonitaj en elektronika formo 15 numeroj de “Bulteno de REU” (n-roj de 90 ĝis 104), entute pli ol 18 paĝoj kaj 8 literaturaj suplementoj al ĝi “Cerbe kaj kore”, entute pli ol 200 paĝoj). Fakte, BdR atingis amplekson kaj signifon de la normala malgranda movada revuo, kaj eĉ ekstaris la demando pri atribuo al ĝi de propra nomo. Tamen, dume proponoj por tio venis en ne sufiĉe granda kvanto, kaj la demando dume estas suspendita. Bedaŭrinde, ne multas aŭtoroj.

CKK ricevis agnoskon inter la kreimuloj, kaj ne nun en Rusio – kontribuoj por ĝi venas el Ĉeĥio, Hungario, Ukrainio, Kazaĥio... Ankaŭ amplekso de ĝi estas sufiĉe granda, kaj, se la kreivo de niaj esperantistoj ne ĉesos, ĝia ekzisto havas daŭran perspektivon por ekzisto.

Krom elektronikaj periodaĵoj, REU eldonis en 2018-2019 jaroj tri paperajn broŝurojn: 1) “Libreto de partoprenanto de Rusia Esperanto-tagoj” (kompilis Nikolao Gudskov – kolora, 12-paĝa, formato A5); 2) 80-paĝa libro de Konstanteno Balmonto “Mi venis al la mond’ por vidi sunon” (tradukoj de Ludmila Novikova kaj aliaj), formato A5, 3) 32-paĝa (formato A4) broŝuro en kolora kovrilo de Boris Kolker “Esperanto dum 10 horoj. Konatiga fulma kurso”. La lasta aperis sufiĉe grandkvante (500 ekz.) kaj estas destinita por allogo al Esperanto de potencialaj esperantistoj post koncernaj plrelegoj kaj similaj varb-aranĝoj.

La ĉefan redaktadon de ĉiuj eldonaĵoj efektivigis Nikolao Gudskov kun konstanta partopreno de Svetlana Smetanina. Tamen la kvalito de la eldonaĵoj estus multte malpli alta, se ne serioza koerakta laboro de Vladimir Opletajev kaj, speciale, Aleksandro Lebedev, kiu elstaras pro atentemo kaj lingva skrupuleco.

Ekster senpera agado de REU private aperis bonegaj eldonaĵoj de V.Opletaev “Postkursa legajho” kaj “Facetoj”.

### **Novaj kaj malnovaj projektoj**

Dum tiu ĉi agadperiodo estis okazigitaj kaj lanĉitaj multaj projektoj. Poezia projekto –konkurso “Ni faru nian poezion internacia”(iniciatinto L. Novikova). “Libroj, kiujn ni legas”, “Fotoj el mia albumo” (uralanoj), “Decembra poezia marŝo” (R. Kudrjavceva, I. Gonĉarova), “Poŝtkruciĝo” (I. Gonĉarova), Sumoo.

Sociopolitika projekto, kie REU partoprenas, estas “La lasta adreso”, ĝi estas dediĉita al eternigo de memoro pri la politikaj reprezaliitoj en Sovetunio.

Aktive funkcias Fonduso por helpi laboron pri la vortaro de B. Kondratjev.

### **Eksteraj rilatoj**

Milde dirante lamas tiu direkto. Pri ĝi okupiĝis M. Ĉertilov. Post lia forpaso neniu dume daŭrigis ĝin. Tamen Lingvaj festivaloj, lokaj aranĝoj vekis intereson en loka gazetaro. La asocio MASI partoprenis en Libra Foiro.

Niaj esperantistoj aktive vojaĝas-partoprenas diversajn internaciajn aranĝojn: ILEI- Konferencojn, UKojn, IJKojn, Aziajn kongresojn, oni instruas kaj prelegas eksterlande (Al. Melnikov, M. Bronshtejn, T. Loskutova, S. Smetanina). Ĉi-somere la unuan fojon ekster Rusio en la plej amasa BET-55 laŭ sugesto kaj rekomendo de S. Smetanina koncertos la muzika grupo “Ekvinokso”. REU faris kontrakton pri kunlaboro kun Jalta biblioteko laŭ onia iniciato.

### **Plia laboro**

En la nomita periodo ni akceptis kelkajn grupojn de alilandaj esperantistoj en Moskvo, SpB, Vladivostoko, Jekaterinburgo, ka. Apartan prelegvojaĝon havis tra 8 urboj la franca pedagogo Fr. Noireau.

### **Malfacilaĵoj kaj negativaj**

Kraŝis REU-paĝaro. Forpasas aktivuloj. Ni ne povas, malgraŭ klopodoj de kelkaj aktive agantaj personoj, renaski kaj revivigi oficiale REJMon.

*Prezidanto de REU  
S.Smetanina*

Majo 2019, Moskvo (daurigota, plenigota)

### **Financaj raportoj de la Estraro de Rusia Esperantista Unio**

Financajn raportojn oni povas vidi en la paĝaro DE reu <http://reu.ru/dokumentoj/eo> :

 [Raporto pri spezoj de la kaso dum la jaro 2017](#)

 [Raporto pri spezoj de la kaso dum la jaro 2018](#)

## Pri la partopreno en la 4-a Lingva trejnado

La 1-an – 4-an de majo 2019 en Jekaterinburgo okazis la 4-a Lingva trejnado. La orda numero sugestas, ke la aranĝo jam iĝis tradicia, kio estas ĝojiga. Nelacigebla Raja Kudrjavceva estis ĉefa kunordiganto de la aranĝo. Mi vizitis la trejnadon kiel lernanto de la kategorio «C», do rakontas vidpunkte de tiu ĉi rolo.

La ĵus pasinta kvara trejnado estas la unua, kie oni proponis specialajn programerojn por «C»-nivelo. Inter tiuj kernis prelegserio de Ilja Gnusarjov pri Esperanto-literaturo. La serio konsistis el kvin apartaj lecionoj, dediĉitaj al diversaj periodoj de E-literaturo ekde la plej malnova ĝis la plej moderna. La strukturo de la lecionoj estis proksimume sama: ĉiu el ili enhavis superrigardon de verkistoj de la koncerna periodo — kiu estas, de kie, listo de la kreitaj ĉefverkoj, impresoj de Ilja pri tiuj, kiujn li legis. Ilja legis multajn, lia erudicio kaj legemeco ravas min! Poste ni kutime gustumis fragmenton de iu verko, laŭlegante ĝin laŭvice. Verŝajne, plej interesis min fragmento el «Mi stelojn jungis al revado» de M. Bronŝtejn. Ĝin ni legis en la lasta leciono, kiu temis pli la lasta periodo de E-literaturo.

Laŭ mia memoro, tiuspeca kurso en Rusio antaŭe ne okazis, almenaŭ dum la lastaj 5–6 jaroj, dum kiuj mi esperantumas. Do, Ilja faris sufiĉe unikan aferon. La prelegserion indas perfektigi kaj ripeti ankaŭ sur novaj placetoj.

Tamen, satlaŭdinte, necesas ankaŭ ĵeti ŝtoneton en la ĝardenon :-). Ilja enkondukis en siajn lecionojn gramatikajn ekzercojn. «Dismeti ĝustajn prepoziciojn», «korekti erarojn en la frazoj» kaj tiel plu — estis ekzercoj, tre similaj al iuj KER-ekzamenaj testoj kaj absolute fremdaj al la temo de la prelegoj. Certe, ni amuziĝis, plenumante la taskojn, sed tio okupis valoran tempon, kiun eblus utiligi, legante/analizante iun plian fragmenton de iu fama verko. Eble, eĉ analizante gramatikflanke, ja gramatiko kaj stilo de E-literaturo de unuaj periodoj certe devas havi siajn specifajn trajtojn, do tio tute konvenus en la prelegoj pri literaturo. Sed ne solvado de testoj ja! Ili estas tute nenecesaj.



«Laboratorio pri tradukarto», gvidata de Irina Gonĉarova, estis alia okupiĝo de «C»-grupanoj. Komence ĉiu el ni faris sian tradukon de peceto el verko de Ulickaja. Poste ni kune legis la tradukojn, pridiskutis, korektis, penis elabori plej bonajn variantojn. Bedaŭrinde, pro manko da tempo, ne ĉiuj tradukpecetoj sukcesis trairi la komunan korektadon.

Kelkaj lecionoj estis destinitaj al du grupoj: «B» kaj «C». Ekzemple, Aleksandr Mitin rakontis, kiel li ekscias kaj memorifikas novajn vortojn pere de verkado de versaĵoj kaj serĉado de rimoj. Irina Gonĉarova okazigis majstroklason pri priskribado de bildoj — mi ne scias, ĉu povas tio utili en ordinara vivo, sed dum vortludoj, en kiuj ludanto devas priskribi bildojn, tiu ĉi scipovo helpas.

Krom lecionoj, kompreneble estis ankaŭ distraj programeroj. Ni ĉiuj ĝuis diversajn ludojn:

«Mediakompostisto» kaj «Kial oni ne diras?» estis gvidataj de Petro Fedosov, «Ĉies-ludon» organizis Aleksandr Mitin, kaj «Literatur-kulturan kvizon» preparis Ilja Gnusarjov. Ĉiuj ludgvidantoj faris tion brile; estis interese kaj gaje. Vespere ludemaj gufoj homlupumis kaj ĉapelumis, kaj kantemaj gufoj ĝuis komunan kantadon. Ĉefgitaris Sergej Kumkov; malfrunokte iomete kontribuis ankaŭ Vadim Solovjov kaj mi. Pri kantoj okazis ankaŭ programero el la lerno-parto — tio estis majstroklaso de Konstantin Ĥlizov «Lernu la lingvon per Esperanto-kantoj». Konstantin, interalie, prezentis sian novan belan kanton.

El movadaj pecoj de la aranĝo indas menciigi «Movadan horon», faritan de Olga Ŝilajeva. Tio estis ronda tablo, kies partoprenantoj laŭvice respondis la demandojn: «Kial mi eklernis Esperanton?», «Kion mi kreas por Esperanto-movado aŭ kiel mi subtenas ĝin?», «Kion mi povas fari por Esperanto-movado?». La unua el la demandoj, laŭ mi, ĉirande estis absolute superflua, kaj ni nur vane perdis tempon, respondante ĝin. La aliaj du demandoj gravas, respondoj de la homoj al ili estis por mi interesaj.

Alia programero, farita de Olga Ŝilajeva — prezento de la filmfestivalo «Teo kaj Amo». Ni spektis kelkajn filmetojn kaj ĝuis ĉinan teon poste.

Kaj fine de la antaŭlasta tago okazis tradicia komuna koncerto. Oni deklamis poeziaĵojn, kantis, prezentis teatraĵeton. Espereble, la publiko restis kontenta.

La antaŭaj Trejnadaj kaj Esprimoj okazadis en unu kutima, ne ŝanĝiganta ripozejo. Ĉi-foje ni loĝis aliloke en alia parto de la urbo. La nova ejo ŝajnas al mi oportuna. En la manĝejo ĉi-foje eĉ estis vegetara manĝaĵo. Tamen, bezonatas ankaŭ eblo tute rifuzi bazejan manĝaĵon kaj ne pagi kontraŭ ĝi, tio povas gravi por veganoj.

Kiel negativan flankon de la trejnado mi notu nesufiĉan komunan tempopasigon de ĉiuj partoprenantoj. Dum lecionaj horoj partoprenantoj estas disigitaj al diversnivelaĵoj grupoj, tio iom ĝenas, sed ŝajnas neevitebla en instrucelaj aranĝoj. Tamen, ankaŭ komunaj programeroj, kie oni atendis partoprenon de ĉiuj, estis vizitataj ĉefe de spertuloj kaj progresantoj kaj estis ĉu neglektataj, ĉu forgesataj de komencantoj. (Aŭ eble tio nur ŝajnis al mi?..) Tio ĉagrenis.

Post la fermo de la trejnado okazis tradicia ekskurso tra Jekaterinburgo. Mi jam partoprenis la similajn en pasintaj jaroj, pro tio ĉi-foje mi decidis promeni aparte, do krom jam konataj lokoj mi sukcesis vidi novajn, ekzemple Kirov-placon kun la universitato.

Grandan dankon al la organizantoj pro la brila aranĝo kaj al la partoprenantoj pro la varma kompanio!

*Aleksandr Lebedev, Moskva provinco*

## La 4-a Lingvotrejnado en Jekaterinburgo: nove kaj denove

Forkuras en historion de Rusia Esperanto-movado la superbaj tagoj de la 4-a Lingvotrejnado, pasinta la 1-4-an de majo 2019 en Jekaterinburgo. Rapidu ni kapti rememorojn, kiuj neniam lasos nin, sed certe perdos sian emocian freŝecon malantaŭ ĉiutagaj aferoj kaj aliaj Esperanto-okazintaĵoj....

Estis speciala evento de multaj vidpunktoj.



La unuan fojon Raja Kudrjavceva — la ĉefa motoro de la aranĝo — restis sen apogo de sia amiko kaj fidela samregiona kunlaboranto Vladimir Opletajev, elstara profesia lingva instruisto kaj metodikisto, kunordiganto de la lernaj programoj de ĉiuj antaŭaj jekaterinburgaj lingvotrejnadoj. La unuan fojon la trejnado pasis en nova ejo, tre problema vidpunkte de kontaktoj kun la administraro — kio multe malfaciligis la organizajn taskojn de Raja, kiu ĉi-foje ja estis devigita kunordigi ankaŭ la instruajn programojn. La unuan fojon MEA MASI subtene proponis sin kiel kunorganizanton, anoncis en marto la aranĝon dum MASI-renkontiĝo APERO-13 kiel vizitindan ankaŭ pro MASI-kunlaboro, venis de kope kaj okazigis 25 (!) programerojn el 44 kaj aliajn aktive konsumadis. La unuan fojon por B kaj C-lingvonivelaj grupoj okazis priliteratura kurso kaj trejnado por prepariĝo al parola parto de KER-ekzameno. La unuan fojon la programojn kontribuis la stelo el la lasta glora periodo de la sovetia, postsovetia kaj internacia Esperanto-movado Andrej Grigorjevskij kaj la leviganta stelo de la

nuntempa rusia kaj internacia Esperanto-movado Ilja Gnuŝarjov. Finfine, la unuan fojon ĉiuj partoprenantoj, krom kutimaj disdoniĝoj kaj regalaĵoj, ricevis la bildkarton kun la ĉarma erinaco — simbolo de la aranĝo. Tamen ne la unuan, sed la kvaran fojon la Lingvotrejnado en Jekaterinburgo pasis tre sukcese kaj neforgeseble!

Nun iom da statistiko por ĝenerala bildo. Al la lingvotrejnado el 20 urboj de Rusio venis 43 diversaĝaj homoj (19 inoj kaj 24 viroj), el kiuj 24 havas Esperanto-staĝon pli ol 10 jarojn kaj 17 — malpli ol 10. Plej multnombre estis prezentita Jekaterinburgo (11 partoprenantoj) kaj Moskva regiono kun la ĉefurbo (8).



La programo estis streĉa kaj tre interesa. Laboris lernogrupoj de tri lingvaj niveloj: A, B kaj C, ĉiu havis sian apartan programon, kompreneble, kun kelkaj komulaj eroj (kiel Malfermo, koncetro ks). Iom da programeroj de la grupoj B kaj C estis komunaj.

La programo de A-grupo konsistis ĉefe el lecionoj — de matenmanĝo ĝis tagmanĝo kaj de tagmanĝo ĝis vespermanĝo. Tiujn lecionojn gvidis Andrej Grigorjevskij (u. Ŝumerlja) kaj Tatjana Vŝivceva (u. Miass), kio evidentiĝis esti bona kombino, ĉar ĉiu instruanto havas sian metodon: Andreo dinamik-komunikan, Tatjana gramatikan. La grupo estis diversaĝa kaj diverspreta lingve, la veraj startuloj preskaŭ foresis, aliaj — ve! — estis eternaj komencantoj. Por sukcese labori kun tiaj grupoj bezonatas speciala lerteco. Ŝajne, la instruantoj estis tamen kontentaj pri la rezultoj de sia laboro.

Kun B-grupo laboris ĉefe Olga Ŝiljaeva (u. Glazov), kiu pripensis varian kreon programon kaj ricevis multajn laŭdojn dum la Malfermo. Irina Gonĉarova (u. Odincovo) havis 3 lecionojn kun emfazo ĉe trejnado por parola parto de KER-ekzameno (dialogo, monologo kaj aŭdkompreno). Multaj programeroj de Ilja Gnasarjov (u. Penza) estis destinitaj por kuna laboro de la grupoj B kaj C.

Grupo C ricevis 6-horan kurson de Ilja Gnasarjov pri la ses periodoj de Esperanto-literaturo kaj de Irina Gonĉarova — trejnadojn pri aŭdkompreno kaj tradukado.

Por B kaj C-niveluloj Petro Fedosov (u. Moskvo) kaj Aleksandro Mitin (u. Niĵnij Novgorod) okazigis tri intereseajn intelektajn ludojn. Ludoj lingvaj ("Ĉapelo" gvid' de Petro) kaj psikologiaj ("Homlupoj"), kompreneble, en Esperanto, furoris ankaŭ nokte, konkurante kun komuna kantado ĉirkaŭ la magneteca Sergeo Kumkov (u. Jekaterinburgo).

Estis ankaŭ primovadaj programeroj. Olga Ŝiljaeva okazigis Movadan Horon, kie oni parolis pri siaj planoj ene de Esperantujo. Kun multaj interesaj proponoj elpaŝis Jelena Kuznecova (u. Samara) kaj Sergeo Kumkov. Aleksandr Basov (u. Luberci) havis sian horan prelegon – pri MASI-projektoj, kiujn li mem aktive kunordigas. Temis pri filmetaro ĉe jutubo "Esperanto: la Unua Kanalo", helpo al la granda Kondratjev-vortaro kaj la traduk-projekto "Lokalizu".

Okazis ankaŭ fermita aktivula kunveno, kiu estis nemultnombra, sed impone reprezenta: Raja Kudrjavceva, Olga Ŝiljaeva, Andrej Grigorjevskij, Aleksandr Mitin, Aleksandr Basov, Aleksandr Lebedev kaj Irina Gonĉarova. Temis pri estonto de la rusia Esperantomovado, REU kaj REJM. La kunveno ne celis kaj ne faris iujn decidojn, sed estis utila zondado de la intencoj kaj inklinoj de la ĉeestantoj, ĉiu el kiuj estas aganta esperantisto kun sia unika movada sperto.

La lastan vesperon ni ĝuis la komunan koncerton, kiun malfermis Petro Fedosov per superba deklamado de la zamenhofa "La Vojo" kaj finis la amuza teatraĵo laŭ la "Provizo" de Samuil Marŝak/ Mikaelo Bronŝtejn, kiun reĝisoris Irina Gonĉarova. Sed pinto de gajo kaj bonhumorigo estis sendube la kantado de Vadim Solovjov (u. Vladimir), kiu provokis iujn ridi ĝislarne.

La programon kronis busa ekskurso tra la urbo kaj — por kelkaj feliĉuloj — tradicia restado en la gastama hejmo de Raja.

Ĉu mi ĉion rakontis al vi pri tiu ĉi elstara evento de la kuranta jaro? Kompreneble, ne. Pro tio mi pardonpetas de la legantoj kaj de tiuj homoj, kiujn mi ne menciis lige kun iliaj aranĝoj. Kio, tamen, nepre farendas, estas dankoj al Raja Kudrjavceva, kiu sukcesis venki ĉiujn malfacilaĵojn, kaj al Pavel Veselov (u. Tjumenjo), nia teknika subteno kaj apogo. Ankaŭ al ĉiuj niaj brilaj programkontribuantoj kaj diligentaj partoprenantoj de la programeroj!

*Irina Gonĉarova  
kunordiganto de MEA MASI*

## OSER-50

OSER-50 sukcese okazis en urbo Tomsk (Rusio) la 1-an – la 5-an de majo 2019. La ĉefa celo estis festi la 40-an naskiĝtagon de Tomska Esperanto-Klubo. Kunvenis la plej fidelaj amikoj de tomskaj esperantistoj kaj de la klubo: 10 esperantistoj el Tomsk, 4 – el Novosibirsk, po 2 – el Novokuzneck kaj Krasnojarsk, po 1 – el Arĥangelsk, Barnaul kaj Seversk (Tomska regiono). Entute – 21 personoj. Multaj aliaj amikoj de la klubo gratulis tomskajn esperantistojn per skajpo aŭ per la interreto. Aleksandro Ŝlafer gratulis el Usono, Lubovj Prudĉenko – el Norvegio, Eric Rademaher – el Germanio, Svetlana Smetanina kaj Konstantin Malasajev [Nikita el USB] – el Moskvo, Miĥail Ŝlafer – el Balakovo, Tatjana Kokoreva/Sungatullina – el Naberejnyje Ĉelny, Multaj esperantistoj – el Novokuzneck. Ankaŭ multaj esperantistoj – el Siberio, Uralo kaj aliaj regionoj. Kelkaj partoprenantoj de la luksa festa bankedo



kantis siajn tradukitajn (en Esperanton) kantojn omaĝe al la klubo kaj al la kluba prezidanto Konstantin Obracov, kiu elektiĝis por la posteno precize antaŭ 10 jaroj en 2009 (en majo). Kaj aliaj partoprenantoj donacis multajn aliajn variajn donacojn. Estis rakontitaj multaj interesaj historiaĵoj el la vivo de la klubo. Ktp.

Okazis ankaŭ multaj aliaj programeroj. La solena malfermo de OSER-50. La interkona kaj kant-amika vespero. Katerina Arbekova kaj Geĉjo Basov gvidis kursojn de Esperanto por komencantoj. Okazis kelkaj ekskursoj laŭ la urbo. Ni vizitis eĉ tiujn enigmajn lokojn, pri kiuj ne sciis tiuj esperantistoj, kiuj dum jardekoj loĝis en Tomsk. Estis spektitaj kelkaj kinofilmoj en Esperanto kun E-subtekstoj, kiujn tradukis tomskaj esperantistoj el la rusa kaj angla. Konstantin Obracov gvidis seminarion pri tradukado de la kinofilmoj kaj libroj (ekzemple pri tradukado de libro "Aĉetitaj Jurnalistoj" el la germana en Esperanto). Katerina Arbekova rakontis pri sia instruado de Esperanto en Francio. Mi rakontis pri organizado de "Seminario pri Opozicia Germana

Literaturo en Germanio" far tomskaj esperantistoj, pri mia vojaĝo al Sxtuttgart (Germanio) por gvidi tiun seminarion kaj pri mia vojaĝo al Munkeno (same en Germanio). Mi prezentis ankaŭ libron "Aĉetitaj ĵurnalistoj" en Esperanto. Evelina Sokolova kaj Geĉjo Basov gvidis intelektajn ludojn en Esperanto. Okazis vizitoj al kelkaj muzeoj kaj teatroj.

Geĉjo Basov, kiel la ĉefo de la organiza komitato, fiksas la tempon por pridiskuti la agadon de Konsilio de Siberiaj Esperantistoj (KSE) kaj de Rusia Esperantista Unio (REU), sed li abrupte kaj arbitre ŝangxis la programon kaj ne avertis multajn partoprenantojn pri tio. Verŝajne li konscie faris tiun fiagon, ĉar li konstante konspiris kaj komplotis kontraŭ KSE antaŭe. Tial al la diskuto venis nur 6 personoj, duono el kiuj estis komencantoj. Tial pro la manko de la kvorumo ni ne povis elekti la novan estraron de KSE. Do ni elektu ĝin en OSER-51. Ni konstatis, ke la ĉefa atingo de KSE estas libera kaj sendependa dissendolisto [[esperanto-rus@yahoo.com](mailto:esperanto-rus@yahoo.com)], kiu sukcese funkcias jam la 17-an jaron, kaj ni konsilas al la esperantistoj aliĝi al ĝi. Kaj fine okazis la solena fermo.

*Vladimir Minin, Tomsk*

## Anatolo Ivasko 70-jara!



Anatolo Ivasko naskiĝis 17.04.1949. Esperantistiĝis li en 1965, en Krasnodar. Lia Esperanto-instruisto estis Vasiliĵ Timofejeviĉ Najdin. Malgraŭ malfacilaĵoj pri eksterlandaj vizitoj en Sovetio, Anatolo skcesis vojaĝi eksterlanden kiel esperantisto al kelkaj socialismaj landoj en la 1970-j jaroj. Estinte profesia ĉiĉrono, li ofte organizis esperantistajn busekskursojn laŭ la bordo de la Nigra maro. Dank' al tiuj vojaĝoj, mi vizitis Soĉion, konatiĝis kun lokaj esperantistoj en jam fora 1979-a jaro. Estis neforgeseblaj ekskursoj al Picunda, Gagry, al la lago Rica en Abĥazio. A. Ivasko aktive partoprenis en organizado de Sud-Rusiaj E-aranĝoj dum la 1970aj-1980aj jaroj en Krasnodara teritorio.

Post malfacilaj 1990-j jaroj ĝuste estis Anatolo Ivasko, kiu revivigis Esperanto-movadon en Krasnodar. Tio okazis en la jaro 2009. Nefacile estis trovi senpagan klubojn. Ne malpli ol trifoje kluboj ŝanĝis lokon. Ĉion organizis Anatolo Ivasko. Nun

krasnodaraj esperantistoj havas certan klubojn en la Centro de Junularo, kien venadas ĉiu dimanĉe. Estas

problemoj kun varbado de "la freŝa sango", tamen veterano ŝatas renkontiĝi en la kluboj kaj ankaŭ hejme ĉe aktivulino Nina Celikova por neformalaj Esperanto-festenoj.

Pro tiuj sukcesoj Anatolo Ivasko ricevis apartan agnoskon de REU: li (kune kun G. Kokolija) estis proklamita "Rusia esperantisto de la jaro 2010".

Ni, krasnodaraj esperantistoj, elkore gratulas nian prezidanton, Anatolo Ivasko, okaze de lia 70-jariĝo! Ni deziras al li sanon, entuziasmon, pozitivajn kaj multajn pliajn aktivajn jarojn en Esperantujo!

*Marina Kocarj, Krasnodar*



## *Bibliografio*

### Katalogo de rusiaj Esperanto-lerniloj, verkitaj, eldonitaj, enretigitaj en RSFSR kaj Rusio ekde 1957

La sesa parto, la antaŭaj partoj aperis en BdR n-roj 99–103

N <sup>o</sup>	Aŭtoro	Titolo	Eldonejo, urbo	Eldon-jaro	Eldon-kvanto	Numero de paĝoj	Mallonga referenca noto	Bitversio, foto, Ĥarto
65	A. Корженков (Александр Викторович Корженков)	«Краткая грамматика эсперанто»	Екатеринбург, издательство «Русланда Эсперантисто»	1997	1000	16	Konciza gramatiko de Esperanto por lernantoj.	
66	A. Корженков (Александр Викторович Корженков)	«Эсперанто-русский словарь: около 2000 слов»	Екатеринбург, издательство «Русланда Эсперантисто»	1997	500	32	Mallonga Esperanta-rusa vortareto por lernantoj de Esperanto kun alfabeto kaj reguloj de prononcado.	

67	А. Корженков (Александр Викторович Корженков)	«Эсперанто-русский словарь: около 2000 слов», 2-е издание.	Екатеринбург, издательство «Ruslanda Esperantisto»	1998	500	32	Mallonga Esperanturusa vortareto por lernantoj de Esperanto kun alfabeto kaj reguloj de prononcado.	
68	А. Корженков (Александр Викторович Корженков)	«Эсперанто-русский словарь: около 2000 слов», 3-е издание.	Екатеринбург, издательство «Ruslanda Esperantisto»	2000	600	32	Mallonga Esperanturusa vortareto por lernantoj de Esperanto kun alfabeto kaj reguloj de prononcado.	
69	Claude Piron Клод Пирон	«Gerda malaperis!» Originala legolibro por komencantoj. 2-a eldono. ISBN 5-7161-0112-7.	“Impeto”, Moskvo	2004		56	Instrua rakonto en Esperanto en formo de simplaj dialogoj el ĉiutage uzataj vortoj kaj taŭgas por plibonigi la konon de Esperanto ĉe lernantoj.	
70	Sergio Pokrovskij (Сергей Борисович Покровский)	Lingvaj respondoj. (Serio Scio. Volumo 3)	Jekaterinburg, издательство «Ruslanda Esperantisto»	1999	500	80	Lingvaj respondoj de akadeamiano Pokrovskij, verkitaj reage al demandoj de legantoj de “Ruslanda esperantisto” en la jaroj 1993 – 1997. La libro estas destinita por lernantoj de Esperanto.	
71	Лиана Тухватулина, Геннадий Шило (Лиана Ирековна Тухватуллина, Геннадий Михайлович Шило)	«Эсперанто за 7 дней» “Esperanto dum 7 tagoj” ISBN 5-85941-237-1	Европейский Университет Юсто. Москва,	2007	1000	104	Septaga intensa baza kurso de Esperanto por studentoj de juraj kaj ekonomikaj fakultatoj.	
72	Лилия Фабретто	“Эсперанто – просто: Курс международного языка”. Перевод с итальянского Бронислав Чупин.	Екатеринбург, издательство «Ruslanda Esperantisto»	1998	500	56 c	Baza gramatika dulingva kurso de Esperanto en 7 lecionoj.	

73	Б.Чупин (Бронислав Денисович Чупин)	“Эсперанто. Калык кусто кылья учебник” Перевод с русского языка Александр Лаптев.	Екатеринбург, издательство «Ruslanda Esperantisto»	2000	600	80	Baza gramatika dulingva (udmurta – Esperanta) kurso de Esperanto.	
74	Шило Г. М. (Геннадий Михайлович Шило)	«Эсперанто в 10 уроках: Учебник для юридических факультетов и вузов»	Москва	2000		52	Baza dulingva kurso de Esperanto.	
75	Евгений Сосов (Евгений Николаевич Сосов, главный редактор )	«20 уроков базового эсперанто»	Техноком. Казань.  <a href="https://vk.com/doc138714614_501024900">https://vk.com/doc138714614_501024900</a>	2019		58 PDF- paĝoj	Baza dulingva gramatika kurso de Esperanto kun la Esperanta- rusa vortareto kaj legotekstoj el “Gerda malaperis!” de Claude Piron.	
76	И. Галицкий (Игорь Викторович Галицкий)	«Эсперанто- русский тематический словарь. Тема vortaro Esperanta-rusa por komencantoj kaj progresantoj»	Москва, издательство «Глаголь»	1991	2000	31	Laŭtema vortaro, konsistanta el 130 ĉapitroj kaj entenanta ĉirkaŭ 4200 vortoj. La vortaro estas destinita por lernantoj de Esperanto.	
77	Игорь Галицкий (Игорь Викторович Галицкий)	«Эсперанто- русский тематический словарь», На правах рукописи. Вариант 1999 года.	RuLit <a href="https://www.rulit.me/books/esperanto-russkij-tematiceskij-slovar-read-492678-1.html">https://www.rulit.me/books/esperanto-russkij-tematiceskij-slovar-read-492678-1.html</a>	1999		23 PDF- paĝoj	Laŭtema vortaro, konsistanta el 130 ĉapitroj kaj entenanta ĉirkaŭ 4200 vortoj. La vortaro estas destinita por lernantoj de Esperanto.	
78	Игорь Галицкий (Игорь Викторович Галицкий)	«Учебник языка эсперанто»	RuLit <a href="https://www.rulit.me/author/galichskij/uchebnik-yazyka-esperanto-get-214688.html">https://www.rulit.me/author/galichskij/uchebnik-yazyka-esperanto-get-214688.html</a>			57 PDF- paĝoj	Baza dulingva gramatika kurso de Esperanto, konsistanta el 100 paragrafoj (ĉapitroj) kaj Esperanta- rusa vortareto.	

Por ĉi tiu parto de la katalogo (65 – 77) kunlaboris Vladimir Opletajev, Aleksandr Korĵenkov, Nikolaj Gudskov, Jevgenij Sosov, Larisa Ŝapoŝnikova.



## Nova lernilo de Boris Kolker

Ĝus eliris el presejo nova libro, la 32-paĝa broŝuro (formato A4) en kolora kovrilo: **Борис Григорьевич Колкер. Эсперанто за 10 часов. Ознакомительный блиц-курс.** РоСЭ, Москва, 2019 (Boris Kolker. Esperanto dum 10 horoj. Konatiga fulma kurso. REU, Moskvo, 2019). Eldonkvanto 500 ekz.

Nova lerniolo de Kolker ne estas vera lernolibro: klaras, ke ellerni la ajnan lingvon (eĉ “facilan” Esperanton :) dum 10 horoj ne eblas. Sed konatiĝi kun ĝia karaktero, kun ĉefaj gramatikaj principoj kaj reguloj, kaj ekinteresiĝi pri ĝia plia lernado – jes, eblas. En tiu senco la gulma kurso daŭrigas la tradician, kiun la aŭtoro komencis en la for a 1982, kiam publikigis 16-lecinan kurson “Esperanto por kemiistoj” en la revuo “Kemio kaj vivo”. La diferenco estas, ke tiu ĉi kurseto celas ne al sciencistoj kaj inĝenieroj, sed al la plej vasta publiko kaj baziĝas sur prezento de temoj ĉiutagaj.

Kiu uzu la lernilon kaj kiel? Unuavice, por propaganda celoj – la libron eblas doni al la homoj, kiuj montris intereson al Esperanto, disdoni al interesitoj post priesperantaj prelegoj (eĉ al lingvistoj!), ks. En la libro troviĝas kelkaj elektronikaj adresoj, uzante kiujn la interesita persono trovos kaj grandajn lernolibrojn, kaj ĉefajn informojn pri Esperanto kaj Esperanto-organizoj. Ĉar delonge similaj disdon-broŝuroj en dispono de rusiaj esperantistoj ne troviĝis, ĝia apero tre gravas. Kaj pri la kvalito de la enhavo dubi ne eblas – la nomo de la aŭtoro parolas per si mem!

Por akiri la libron turnu vin al Svetlana Smetanina (svsmetanina@yandex.ru), la prezo de unu ekzemplero estas nur 50 rubloj. Plenumantoj de specialaj projektoj (prelegoj pri la lingvo en specialaj aŭditorioj, prezentoj de Esperanto dum lingvaj festivaloj ks.) povos ricevi laŭ interkonsento certan kvanton da broŝuroj senpage – kiel materian kontribuon por konkreta projekto.



## Oni pri ni

### “Mia planedo” pri Esperanto



Tiu ĉi foto aperis en la paĝaro de la televidkanalo “Mia planedo” (Моя планета) [https://www.moya-planeta.ru/travel/view/nahodki\\_nedeli\\_46411/](https://www.moya-planeta.ru/travel/view/nahodki_nedeli_46411/) en la rubriko “Trovaĵoj de la semajno” la 24-an de majo. La subskribo estas: “Sur tiu ĉi foto, farita en Peterburgo (tiam – Petrogrado) en 1919-a jaro estas fiksita, kia amaso da dezirantoj venis enskribiĝi al la kursoj de Esperanto, kaj poste estas kelkaj vortoj pri tio, kio ja estas Esperanto. Neniuj specialaj komentoj estas, nek informoj pri la nuna stato de la lingvo kaj movado, sed mem la publikigo sen ajnaj negativaj vortoj estas ĝojiga afero.

Kaj en la paĝaro de la alta televidkanalo **K 24** (<https://katun24.ru/news/563054>) la 29-an de majo estas rakonto pri

tiu, kiel gaste al la barnaulaj esperantistoj, kaj persone – al Igoprj Akimenko, venis vojaĝanta esperantisto, hinda pentristo kaj skulptisto Adrinajara Maĉavarapu, kiu poste planas daŭrigi sian vojaĝon al Krasnojarsko. Denove estas mallonga inform pri Esperanto kaj pri esperantista komunumo.

Nikolao Gudskov

## UEA informas

## ESPERANTO.NET



Ni invitas vin ekkoni kaj uzi gravan rimedon por disvastigi Esperanton. [Esperanto.net](https://esperanto.net) estas retejo de UEA, kiu provizas bazajn informojn pri Esperanto, kiel lerni ĝin kaj kiel kontakti landajn, regionajn aŭ lokajn asociojn. Tiuj informoj disponeblas en 66 lingvoj kaj la retejo aŭtomate montras la lingvon de la vizitanto.

## Amikoj de Esperanto



Per la retejo jam aliĝis pli ol 600 Amikoj de Esperanto, kiuj konsistas el homoj, kiuj ĵus konatiĝis kun Esperanto kaj al kiuj ni sendas mesaĝojn por sciigi ilin pri la lingvo, pri UEA, pri TEJO kaj pri la koncerna landa asocio.

Ni sendas la enkondukan dulingvan mesaĝon en Esperanto kaj la [angla](#), [araba](#), [farsia](#), [portugala](#), [hispana](#) kaj [franca](#). Tiuj lingvoj reprezentas 87% el ĉiuj aliĝintoj. Se vi volas helpi nin sendi mesaĝojn ankaŭ en via lingvo, bonvolu [kontakti nin](#).

Ni sendos ankaŭ mesaĝojn en Esperanto al eks-membroj de UEA.

## Traduko kaj plibonigo de la tekstoj



La nova versio de la retejo disponeblas en 16 lingvoj. Ni bezonas volontulojn por traduki aŭ plibonigi tradukojn. Ni proponas ne laŭliteran tradukon, sed adaptan de la baza teksto en Esperanto. Ni sugestas, ke oni kreu laborgrupojn por tradukado kaj plibonigo de la tekstoj, preferinde kun la partopreno de la koncerna Landa Asocio. Se vi volas ricevi la tradukendajn dosierojn, bonvolu [kontakti nin](#).

## Ĝisdatigo de la mondmapo



En nia retejo estas bela mondmapo, kiu montras esperantajn asociojn aŭ klubojn. Bonvolu viziti <http://esperanto.net/eo/lokaj-organizoj> kaj kontroli la informon pri via urbo. Vi povas tajpi la nomon de via urbo en la kadro aŭ premi la regklavon (CTRL) de via klavaro kaj samtempe ruli la centran radeton de via komputila muso por pligrandigi la areon serĉatan. Se vi trovas eraron aŭ mankon en la mapo, bonvolu indiki tion per nia formularo: <http://tinyurl.com/mondmapo>.

## Unu lerneja leciono pri Esperanto!



En la baza lernejo, ĉiuj devus lerni iom pri Esperanto, minimume per unu leciono. Tiu leciono povus okazi kadre de la instruado de fremdaj lingvoj, aŭ de aliaj temoj (ekz. historio, sociaj kaj politikaj sciencoj). Konatiĝu kun la baza ideo de Klaus Friese, kiu vizitis jam pli ol cent lernejojn en Germanio: <http://esperanto.net/eo/leciono/>.

### Kunagu kun ni!

grupoj en via lingvo. Partoprenu!

Ĉi tiu retejo apartenas al vi. Uzu ĝin kaj helpu nin disvastigi ĝin al ĉiuj. Indiku la retejon al viaj ne-esperantistaj amikoj. Plusendu tiun mesaĝon en la diskuto-listoj kaj

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 804 2019-05-28

---

**Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "RUSIA ESPERANTISTA UNIO"**  
BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) aŭ (kaj) Svetlana Smetanina [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*

Redaktofino 30.05.2019